

Jean de La Fontaine,
La korvo kaj la vulpo

tradukita de Pejno Simono

Fraŭlo Korvo, jen arbopinte,
Tenis enbeke fromaĝon.
Fraŭlo Vulpo, tiun spurinte,
Voĉis allogan omaĝon.
“He, saluton, sinjoro Korvul’.
Vi bela! Vi rava! Vi ĝu’ por l’ okul’!
Sincere, se via fanfaro
Egalus al via plumaro,
Vi estus fenikso de l’ boska popol’.”
La Korvo ĝojegis ĉe tiu parol’.
Li por najtingali
La bekon malŝlosis, igante la predon elfali.
La Vulpo ĝin kaptis kaj diris “Bona moŝto,
Ke flatado je l’ kosto
De l’ aŭdintoj bonvivas, lernu vi nu.
Valoras fromaĝon do tiu instru’.”
La Korvo, konfuza kaj honta,
Malfrue nun ĵuris pri klero estonta.

*Traduko de la Franca poemo “Le Corbeau et Le Renard” de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-975-1964 (2014-03-13 13:17:21)

Pri la tradukinto vidu la retejojn http://fr.wikipedia.org/wiki/Simon_Edward_Adrian_Payne respektive http://eo.wikipedia.org/wiki/Pejno_Simono.